Vi lernos, kaj praktikos (Verbo I + Verbo II)

Ekzemploj: Ĉu vi ŝatas vidi filmojn en kinejo?
Ĉu vi deziras iri al la restoracio kun ni?
Bonvolu doni al mi kafon kun lakto.

1 Ĉu vi ŝatas vidi filmojn en la kinejo?
2 Ĉu al vi plaĉas manĝi glaciaĵon en la varmaj tagoj de la somero?
3 Ĉu vi deziras lerni multe da Esperanto?
4 Ĉu vi volas paroli Esperanton tre flue kaj senhezite?

5 Ĉu vi povus doni al mi bulkrajonon?
6 Ĉu vi povus doni al mi moneron por aĉeti poŝtmarkon?
7 Ĉu vi povas pruntedoni al mi dudek mil dolarojn?
8 Ĉu vi deziras manĝi kun mi en bona restoracio morgaŭ?

9 Ĉu vi deziras akompani min al kinejo postmorgaŭ?
10 Ĉu vi volas trinki kafon aŭ teon kun mi sabate vespere?
11 Ĉu vi deziras studi Esperanton kun mi kaj miaj geamikoj morgaŭ?
12 Ĉu vi volas iri kun mi kaj kun la aliaj Esperantistoj al staĝo de Esperanto en la Alpoj en la venonta jaro?

13 Kiam vi komencis lerni la internacian lingvon Esperanton?
14 Je kioma horo vi komencas kaj ĉesas labori?
15 Ĉu oni devas paroli esperante aŭ ĉu oni devas paroli angle dum nia kurso de Esperanto?
16 Kiel oni devas paroli en kurso de la japana lingvo?

17 Ĉu oni devas obei la leĝojn de nia lando?
18 Bonvolu redemandi al mi la trian demandon.
19 Ĉu oni rajtas fumi en aŭtobusoj kaj tramoj en via lando?

20 Ĉu eblas lerni la anglan lingvon en dek tagoj?
21 Ĉu vi ofte aŭ malofte forgesas uzi la finaĵojn A, O, AJ, OJ, AN, ON, AJN, OJN?
22 Kion ni devas fari por lerni Esperanton rapide?